

ESPERANTO

TRIUMFANTA

Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝonta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“ senpage por ET-abonantoj.

Prezo de unu numero por la landoj kun kolonioj:

Argent. 0.15 Peso	Ceĥosl. 1.20 Kr.	Germana 600 Mk.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.60 Esk.
Aŭstra 1500 Kr.	Estona —	(Abonu nur ĉe poŝtoŭcelo)	Latvia —	Rumana 4 Leol.
Belga 0.65 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	Itala 0.80 Lir.	Litova 30 Cd.	Rusa 200 Gmk.
Brazila 0.400 Mr.	Francja 0.60 Fk.	Japana 0.10 Jen.	Nederl. 0.15 Hfl.	Sveda 0.24 Kr.
Brita 3/4 Pc.	Hispana 0.30 Pes.	Jugosl. 2.50 Din.	Norvega 0.30 Kr.	Svisa 0.30 Fk.
Bulgara 4 Levul.	Hungara 60 Kr.		Pola 800 Mk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Neomitat landoj pagu provizore egalvaloron de 0.20 sv. fk. aŭ 0.04 Dol.

Por Adresanĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 200 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Por „Internacia Komercio“ kaj specialaj numeroj speciala prezo.

★
Maljusta
estas komparo de la prezo de ET kun la prezo de naclaj jurnaloj. Kiam ET havos 50 000 abonantojn kaj centojn da bone pagataj anoncoj en ĉiu numero, ĝi estos same malkara kiel naclaj jurnalo!
★

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Qili Noria, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, București (Rumi.)
Teo Jung, Köln (Kolonio)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtĉekkonto Köln 70868, por Teo Jung, Horrem.

Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Literatura red.: Zanoni.

N-o 128 :: Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 18. III. 23.

Jam 33 landoj prezentotaj en Nürnberg

Restadpermeso donita por tri semajnoj. Reprezento de fama dramo „Natan la Saĝulo“.
Leipziga Foiro montros specialan filmon pri la germana industrio.

XV-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg.

Aligoj. Aligis ĝis fino de februaro 2192 kongresanoj el 33 landoj. Ni petas, ke per tua aliĝado oni helpu kaj plifaciligu la laboron de LKK.
Kongreskotizo. Pro ĝenerala malplivalorigo de la germana marko dum la pasinta kvaronjaro ni estas bedaŭre devigataj denove plialtigi la kongreskotizojn por aŭstroj, germanoj, poloj, hungaroj kaj rusoj, fiksante ĝin je 3000 gmk. depost la 1-a de aprilo.
Por plifaciligi kaj malkarigi la aliĝadon de eksterlandanoj, ni rajtigas kaj petas la Naciajn Asociojn kolekti la aliĝilojn kaj kotizojn de siaj anoj kaj transsendi ilin kune je fino de ĉiu monato al LKK.

Restadpermeso. Laŭ dekreto de Distrikta Polico, la kongresa karto havigas la permeson restadi tri semajnojn en tuta Bavarujo. La eksterlandanoj ricevas rabaton de proksimume tri kvaronoj de la oficiala takso. Pri pasporto kaj vizo ni informos pli poste.

Loĝigo. Multaj samideanoj petis pri perado de malkaraj loĝoj. Volonte ni atentis pri tio kaj aranĝos ankaŭ komunajn dumnoktejojn.
Apudaj kongresoj. Rekte antaŭ la Universala Kongreso okazos en Nürnberg apartaj kongresoj de Germana Esperanto Asocio, Internacia Kato-lika Unuigo Esperantista kaj Tutmonda Polica Ligo.

Blinduloj. Dum la XV-a okazos ankaŭ la 3-a internacia blindula kongreso. Aligis ĝis nun 45 blinduloj el 7 landoj. Ili havos senkostajn kongresan karton kaj loĝejon ĉu en la Blindula Instituto ĉu en najbara lernejo. La elspezoj por la manĝoj, kiujn disponigos la Instituto je memkostoj, estas pagotaj per la donacoj al la blindula kaso. Eventualej kondukantoj de la blinduloj ricevos la samajn favoraĵojn, sed pagos la kongreskotizon. Aranĝo de koncerto estas projektata.

- Fakkunsidoj. Estas plue anoncigitaj la jenaj fakkunsidoj:
- Internacia Esp. Ligo de Liberpensuloj kaj Monistoj; Adr. Kurt Hubricht, Leipzig-Neustadt, Mariannenstr. 30/III.
 - Teozofia Esp. Ligo; Adr.: F-ino Maria van Rees, ĉefsekretarino, Wilderswill, Chatet Bertha, Svislando.
 - Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj; Adr.: Erich Habelok, Breslau, Schleiermacherstr. 19.
 - Kristana Esperantista Ligo; Adr.: Paul Hübner, Quedlinburg, Bergstrasse 1a.
 - „Konkordo“ Adr.: Edvardo Wiesenfeld, Warszawa, Biala 3.
 - Aŭstruja Esp. Delegitaro; Adr.: Centra Oficejo, Wien, Mollardgasse 55.
 - por psikistoj; Adr.: Direktoro L. Gube Berlin-Friedenau, Fregestrasse 26.
 - por studado de naclaj lingvoj; Adr.: Johann Jungfer, Lübben N.-L., Lindenstrasse 10.

Por certigi fruktodonan daŭrigon, ni petas la interesulojn, jam nun interkonspondadi pri la preparoj, starigo de progamo, elekto de referentoj ktp., turnante sin al la nomitaj adresoj.
Ĉiu fako aŭ nacia societo, kiu intencas aranĝi apartan kunsidon, estas petata, kumuniki ĝin ĝis la 1-a de majo al LKK.

Festaranĝoj. Krom aliaj festaranĝoj ni reprezentigos la faman dramon „Natan la saĝulo“ de E. Lessing, Esperantigita de Karl Minor kaj eldonota ĉe Ellersiek & Borel, Berlin. La teatraĵo estas ludata de eminentaj geaktoroj de la Urba Teatro, kiuj jam nun fervore studas Esperanton en speciala kurso.

Por la projektata Internacia Dancrevuo, kiu estas certe atrakcio en la kongreso, ni petas la Naciajn Asociojn kaj Societojn, konigi jam nun proponojn kaj deziresprimojn. Estus bone, se ĉiu nacio estus reprezentata de almenaŭ 4 paroj, kiuj dancas en naclaj kostumoj kaj laŭ originala muziko de sia lando. Premioj estas disdonotaj.

Poŝtoŭcelo. En la kongresa kunveno troviĝos arparta poŝtoŭcelo kun Esp. oficistoj. La

leteroj kaj poŝtkartoj estos stampataj per oficiala stampilo. Jam nun elirantaj poŝtaĵoj surhavas reklamstampojn kun la teksto: Vizitu la XV-an Universalan Kongreson de Esperanto en Nürnberg, 2.—8. aŭgusto 23.

Kongressigno. Bela arta signo arĝentita, surhavana verdan stelon kaj vidajon de la Nürnberga Kastelo, estas preta. Ĝi estos disdonata al la kongresanoj en la Akceptejo.

Propagando. Glumarkoj — pro malaktualeco — kaj kongresafiŝoj — pro multekosteco — ne estas eldonataj, tiom malpli, ĉar la propaganda valoro laŭsperte ne estas konsiderinda. Serio da belaj ilustr. poŝtkartoj kaj aliaj memorajoj pri la kongresurbo estas en preparo.

Komerclista propagando. Diversaj gravaj komercistaj firmoj disdonigos Esperantlingvajn prospektojn kaj reklamilojn. La Leipziga Foiro montrigos specialan filmon pri la industrio de Germanujo. Similaj aranĝoj estas projektataj.

Korespondado. Pro la grava plialtigo de la poŝtarifoj ni petas denove aldonon de respondopononoj, kiam oni petas informojn.

Loka Kongresa Komitato.

Esperanto-Agentejoj.

Kun granda intereso mi legis la proponon de D-ro Leono Zamenhof en ET n-o 122, kaj mi tre deziras la efektividon de komercaj interrilatoj laŭ la priskribita sistemo. Kiel praktika komercisto mi tamen iomete dubas pri la sukceso. Aranĝi agentejojn en ĉiuj grandaj urboj ne jam certigas profitan negocadon, kaj sen profito neniu agento povas vivi, des malpli subteni niajn instituciojn.

Ĉiun negocon oni devas prilabori laŭ komercaj kaj ofte ankaŭ teknikaj spertoj. Tial agento ne povas okupi sin per ĉiu ajn komercaĵo, sed li devas specialigi sin sur la kampo, kiun li konas laŭ praktika sperto. Antaŭ ol starigi agentejojn, oni devas esplori la demandon, ĉu estos eble sukcesi en la komerca konkurado, ĉu ne. Miaj

ĝisnunaj spertoj respondas: ne. Starigi amason da agentejoj Esperantistaj signifas sub la nunaj cirkonstancoj nur pligrandigon de Esperanto-institucioj sen praktika valoro.

Mi ne volas diri, ke la Esperanto-movado ne kapablas subteni komercajn interrilatojn. Kontraŭe ĝi estas la plej bona rimedo, negoci kun ĉiuj landoj, kaj pli bonan helpilon la komercisto certe ne trovas. Sed la komercisto, kiu ne jam estas Esperanto-idealisto, nur tiam uzos la helpilon, kiam li ekkonos la utilon. En ĉi tiu rilato estas ĝis nun granda manko. Ja ekzistas multaj firmoj jam uzantaj nian lingvon; en la jarlibro de UEA oni trovas adresojn de Esperanto-entreprenoj, kiuj proponas komercaĵojn. Oni devus pensi, ke estus facile, per ĉi tiuj adresoj gajni novajn klientojn, disvastigi la negocadon al pliaj landoj, antaŭe ne jam prilaboritaj, aŭ trovi novajn fontojn por aĉeti importaĵojn.

Jam depost kelkaj jaroj mi laboras en ĉi tiu direkto. Tamen la sukceso estas nur tre malgranda rilate al la laboro. Ĉiu komercisto scias, ke la plej multo de cirkuleroj, ofertoj ktp. flugas nelegitaj en la paperkorbon, kaj li estas kontenta se nur 10% de la elsenditaj leteroj sukcesas mendojn aŭ respondojn. Mi spertis, ke en Esperantujo oni devas esti multe pli modesta. Kun granda persisto mi skribis ekz. al Esperanto-entreprenoj en Finnlando, Estlando ktp., ne nur por vendi, sed ankaŭ por aĉeti materion, kiun la firmoj en la anoncoj proponas, sed neniam alvenis respondo. Mi provis per helpo de samideanoj trovi agentejojn en eksterlando. Kelkaj delegitoj de UEA respondis, sed agenton mi ne trovis. Mi ricevis industriajn adresojn nur per instruistoj (!), sed la komercistoj, al kiuj mi unuavice turnis min, silentis.

Mi vidas, ke ĉiusemajne vaporŝipoj plenaj je komercaĵoj forveturas al Finnlando, kaj mi ne dubas, ke la Esperantistoj povus peradi multon de tiuj negocoj, se ili klopudus pri tio. Sed bedaŭrinde mi ofte havas la impreson, ke la Esperantistoj ne povas esti komercistoj; ili dormas anstataŭ labori kaj kapti profiton, kie ĝi estas havebla.

La Scienco de l' Amo.

De D. Merejkovskij.
Esperantigis M. Kalina. (Fino.)

„Majstro, ĵetu for el viaj pensoj tian sensencan, ĉar ne estis kaj ne estas vidata en la tuta mondo virino pli modesta kaj virta ol via edzino. Ĉio estas ebla, sed ne tio, ni scias bone.“

„Vi scias nenion!“ kriis la majstro; „mi diras, ke per miaj propraj okuloj mi vidis la amanton, kaj mi scias, ke li nun troviĝas en mia domo.“

Ĝustatempe alkuris la du fratoj, de Giovanino. Ekvidinte ilin ŝi ekploris eĉ pli forte kaj diris:

„Kara frato, mia edzo frenezigiĝis kaj intencas min mortigi. Li diras, ke mi enlasis keĵmen amaton, kion vi diras pri tio? Vi ja scias, kia virino mi estas, ke mi ne estas edukita, por suferi tiajn ofendojn.“

La fratoj diris:

„Ni tre miras, ke vi kuraĝas nomi nian fratinojn senvirta virino. Kiom da jaroj vi travivis kune en modela konsento! Kio do okazis hodiaŭ kaj pro kio tia kolerego kontraŭ ŝi?“

„Mi vidis amanton“, ripetis messero Fabricjo, mi lin vidis per miaj propraj okuloj!“

„Bone“, respondis la fratoj, „ni serĉos, kaj se ni trovos lin, ni punos ŝin tiamaniere, ke vi plene kontentiĝos.“

Unu el la fratoj vokis la fratinojn flanken kaj demandis:

„Diru la veron, ĉu iu sin kaŝas ĉi tie?“

„Kion vi pensas“, ekkriis Giovanino, „hontu eĉ demandi pri tio! Dio savu min de tia malhonoro! Mi preferus milfoje morti, ol efektiviĝi aŭ eĉ ekpensi ion similan.“

La fratoj plene trankviligitaj per ĉi tiuj vortoj komencis kune kun messero Fabricjo la serĉadon. La majstro ekvidinte amason da tolaĵoj, tuj sin ĵetis kontraŭ ĝi, kvazaŭ tio estus Buĉiolo mem, ĉar li esperis trapiki lin kaŝitan en la tolaĵoj.

„Jen, vi klare vidas“, diris sinjorino Giovanino svingante la manojn, „ĉu mi ne diris, ke li frenezigiĝis? Ĉu ne estas evidenta frenezeco difekti sian propran havaĵon, kiu neniel povas esti kulpa?“

La fratoj traserĉis la tutan domon, trovis nenion kaj certigiĝis, ke la malfeliĉa majstro efektive falis en abismon de frenezeco.

Unu do diris:

„Li frenezigiĝis.“
La dua aldonis:

„Majstro, kara majstro konsentu, ke vi estis tre malprava, nomante nian fratinojn malvirta virino.“

Aŭdinte ĉi tion, la profesoro efektive furioziĝis, ĉar li ne povis dubi pri tio, kion li vidis per la propraj okuloj, kaj li komencis verŝi sur ilin la plej krudajn insultojn kaj dume li firme tenis per la mano la nudan glavon. Jen ili sin ĵetis kontraŭ li, lin kaptis, senarmigis, ŝnurligis liajn kruojn kaj brakojn kaj tia restiĝis lin dum la tuta nokto; ili mem foriris kune kun la fratino por ripozi kaj dormi. Matene ili alvokis la kuraciston, kiu receptis medikamenton, ordonis meti sur la kapon de l' malsanulo glacian, aplikis sangellason kaj konsilis, ke neniu interparolu kun li, eĉ ne respondu liajn demandojn, ankaŭ li rekomendis severan dieton ĝis finiĝos la parokismo.

Ĉi tio estis plenumata plej precize.

En Bolonjo disvastiĝis la tre malĝojiga famo, ke messero Fabricjo, eminenta doktoro de dia-

lektiko, la reĝo de la silogismoj, frenezigiĝis. Ĉiuj kondolencis. La studentoj mumuris inter si:

„Mi jam hieraŭ rimarkis, ke nia majstro kvazaŭ aliĝis. Ĉu vi rememoras, ke li ne povis eĉ fini la lecionon kaj kiel stranga estis lia vizaĝo?“

Multaj aliaj kaŝe ĝojis pro malico.

„Jen, kien kondukas troa instruiteco. Neatendite la diablo forrabas ĉiujn intelektajn kapablojn.“

La studentoj decidis viziti la malsanan profesoron.

Buĉiolo nenion sciante venis la universitaton, por rakonti al messero Fabricjo pri siaj novaj okazintaĵoj. Sed ĉi tie li informiĝis, ke la profesoro perdis la konscion. Buĉiolo ekmiris, tre ĉagreniĝis kaj kune kun siaj kamaradoj iris viziti la malsanulon. Sed kiam li komprenis kien kaj en kies domon ili sin direktas, lia konsterno kaj teruro estis senlima, kaj preskaŭ li svenis. Timante, ke iu rimarkos lian konfuzon, li eniris post la kamaradoj la domon kaj ekvidis sinjoron Fabricjon en la lito, ŝnurligitan, palan, kun la kapo kovrita per veziko da glacio. La studentoj unu post la alia alproksimiĝis al la profesoro kaj esprimis sian kompaton kaj simpation. Kiam estis la vico de Buĉiolo, li alpaŝis al messero Fabricjo kaj diris:

„Kara Instrulisto, mi amas kaj estimas vin kiel mian propran patron, kaj pro tio, se mi povas fari ion por vi, ordonu kiel al via filo.“

La majstro, vidante lian koran penton, bonanime respondis:

„Buĉiolo, Buĉiolo iru kaj Dio vin gardu! Sufiĉe vi lernis je mia konto, kvankam verdire vi lernis ion ankaŭ al mi.“

Sinjorino Giovanino intermetis:

„Ne atentu, sinjoro, liajn vortojn, li deliras.“

Kaj Buĉiolo tre rapide foriris, retrovis Petron Paolon kaj diris al li:

„Restu feliĉa, frato. Mi tiel multe lernis ĉi tie, ke la deziro ankoraŭ daŭrigi la studojn, absolute forestas.“

Per tiuj vortoj li adiaŭis la amikon, tuj prepariĝis por vojaĝo kaj feliĉe alvenis Romon.

Nokta kanteto.

*Dormu dolĉe knabinejo,
Dormu mia kortezor;
Dum la dormo ĉiuj zorgoj
Kaj suferoj estas for.*

*Revu romantikajn revojn,
Senmalica virgulin',
Pri heroo, bela princo
Kaj blondhara la princin'.*

*Revu pri pli bona mondo,
Pri la promesita ter',
Kie regos inter ĉiuj
nur la amo kaj la ver'.*

*Mi, mi scias ne ekdormi,
Turmentata per dolor' ...
Dormu dolĉe knabinejo,
Dormu mia la trezor'*

Jan van Schoor, Antwerpen.

MANKAS
taŭgaj manuskriptoj (prozaĵoj) el la literaturoj itala, hispana, franca, brita, skandinava k. a. Se vi deziras, ke ni publikigu tiajn, bonvolu provizi nin!

En tiu grado la malvigleco malhelpas nian tutan movadon, oni komprenas, se oni scias ke nur malmultaj ĉefoj de komercaj kaj industriaj firmoj estas Esperantistoj. Ĉiam nur unu aŭ kelkaj oficistoj akcelas la uzadon de Esperanto por la internacia negoco. Ekzemple firmo bezonanta materion el eksterlando, ne scias liveranton por ĝi. La Esperanto-oficisto asertas, ke li per la samideanoj en la koncerna lando povos havigi la materion. Li skribas, kaj denove skribas, sed respondo neniam alvenas. La ĉefo demandas, kiel restas la ofertoj, kaj fine li estas konvinkita, ke la Esperanto-movado taŭgas nenion. Li malpermesas forjeti plian afrankon por ĝi kaj ordonas uzi laŭ ĝisnuna maniero la anglan aŭ francan lingvon ankaŭ al landoj, kie ĝi ne estas komprenata. Anstataŭ gajni vovan amikon kaj subtenanton por nia afero, la nerespondintaj samideanoj kreis plian malamikon.

Tial ŝajnas al mi pli grave ol starigi novajn komercajn agentejojn, vigligi la jam ekzistantajn entreprenojn. Por la novaj agentejoj oni jam povas elekti kiel gvidantojn nur la samideanojn, kiuj jam nun laboras en la komerco kaj laŭeble jam uzas nian lingvon. Se ili etendigas la uzadon de Esperanto por la internacia korespondado, tio estas pli utila ol novaj entreprenoj. En la kadro de la ĝisnuna laboro kun la rimedoj de malnovaj firmoj, kiuj donas la monon kaj la rilatojn al fabrikistoj aŭ klientoj por efektiviĝi la negocadon, la samideanoj povos pli efike utili al nia afero ol kiel memstaraj agentoj sen monrimedo kaj kredito ĉe la fabrikistoj. Necesege nur estas, ke ĉiu samideano, precipe tiuj ĉe grandaj firmoj, kiuj volas aĉeti el eksterlando, prefere mendos ĉe firmoj, kiuj uzas Esperanton por la korespondado. La samideanoj, kiuj ricevas demandojn pri prezoj ktp., havas la devigon en ĉiu okazo respondi. Se ili ne mem povas liveri la postulitajn komercaĵojn, ili devas klopodi, ke alia firmo liveros je moderaj prezoj, aŭ almenaŭ doni al la demandinto kiel eble plej detalajn klarigojn, kiel la bezonata komercaĵo estos ricevebla. Delegitoj de UEA jam ekzistas en preskaŭ ĉiu granda urbo de la tuta mondo. Pli grandan nombron da agentoj laŭ la Zamenhofa sistemo oni ne trovas. Kiam oni ne jam scias adreson de liveronto, oni skribu al la delegito de UEA, kiu perigu la aferon, kaj sendigu ofertan ktp. per firmo el la koncerna branĉo, aŭ, se tio ne estas ebla, li sendu klarigon, kial li ne povas plenumi la peton. Mi ripetas, ke en ĉiu okazo respondo devos alveni. Se la komercistoj vidas, ke la Esperantistoj pli atente peradas la negocojn ol aliaj perantoj, ili pli kaj pli preferos niajn entreprenojn, kiuj tiel el si mem etendiĝos paŝo post paŝo. Kiam la rilatoj estos sufiĉe viglaj, ke ili donas realan profiton, la komercistoj ankaŭ povos subteni niajn idealajn instituciojn, utilante al nia tuta movado.

Kritikante la malviglecon de Esperanto-entreprenoj, me ne forgesas, ke kelkaj samideanoj atente respondis. Sed la nombro de la atentuloj estas tro malgranda.

Heinrich Selmer, Lübeck.

Akademio.

Cirkulero de la Prezidanto al la L. K.-anoj.
Paris, 25. 2. 23.

Kara Kolego!

Al vi mi sendas:

1. Noton de l' Direktoro por la Komuna Vortaro pri duoblaj formoj en Oficiala Radikaro.

2. Proponon de la Akademio pri dispartigo de la L. K.-anoj en diversaj jaroj, tiamaniere ke ni eliru el la nuna haoso, konsekvence de la mondmilito.

3. Liston de kandidatoj en la L. K. prezentataj de la Akademio laŭ § 6 de nia Regularo.

Tre bone mi scias, ke ĉio tio ĉi ne estas perfekta, ke facilaj estas la kritikoj, ke en la listo nomoj mankas, kiuj eble devus troviĝi en ĝi, sed niajn lingvajn instituciojn ni nur iom post iom plibonigos: ĉiu subita, „kruda“ reformo en viva organismo estas ja danĝera. Estu pacienca, havu konfidon, fine nia organizo kaj niaj senbruaĵaj praktikaj laboroj (Eraraj tradukoj en U. V., Oficiala Radikaro. — Eldono de Of. Rad. kun Esperanta difino kaj nacilingvaj tradukoj en preparo ktp.) estos tial, ke neniu Esperantisto rajtos ignori nian L. K.-on kaj ke ĉiu ĝin respektos, ĉar ĝi estas kaj estos la fidela gardanto de nia internacia lingva unueco, nepra kondiĉo de nia venko.

Via tre fidela

Th. Cart, prez. de la L. K.

P.S. En mia Raporto por la kongreso mi preparolos la starigon de diversaj fakaj komisionoj, la rilatojn kun la komitato por scienco kaj teknika vortaro kaj aliajn sufiĉe gravajn demandojn. — Pardonu, se rapidan respondon, antaŭ la 31. de Marto, mi postulas, sed 1. kiam tro da tempo oni donas, multaj forgesas kaj fine tute ne respondas, 2. antaŭ la fino de aprilo mi devos re sendi al vi liston de kandidatoj por la Akademio, tiamaniere ke ĉio estu en plena ordo antaŭ la kongreso.

Th. C.

I. Noto pri kelkaj radikoj en Of. Radikaro.

Analog' aŭ Analog'.

La ideo esprimata de la radikoj *analog'* 1. respondas al: „parte simila“, analogue, analogous, analog, analogo. Ĝi ŝajnas preferinda, tiom pli ke el ĝi oni povas eltiri la formon: analogeco (anst. analogio). 2. La akcentitaj *i* estas jam sufiĉe oftaj en nia lingvo kaj tio ŝajnas dezirinda, ke oni eviiu ilin, kiam eble.

Konfidenc' aŭ Konfidenci'.

Du gravaj faktoroj rekomendas la formon: *konfidenc'*. 1. Ĉiuj samflanj radikoj en U. V. kaj en la Of. Aldono, respondantaj al latinaj vortoj finiĝantaj per *entia*, finiĝas per: *enc'*, ne per *enci'* (diferenc', konscienc', paclenc' ktp.) 2. Vidu: analog' 2.1

Nekrolog' aŭ Nekrologi'.

1. Estas certe, ke la formo: *nekrologi'* estas pli internacia. Tamen mi proponis al la L. K. la formon: *nekrolog'* pro tio, ke Zamenhof kaj preskaŭ ĉiuj vortaristoj (Bein, Backmann, Bendix, Fulcher & Long, Korzliniskij, Kühnl, Millidge, Török) preferis ĝin. — 1.: Vidu analog' 2.1

Jezu' au Jesu'.

La formon *Jesu'* preferis Zamenhof kaj plej multaj sekvis la Majstron. Certe estas, ke la formo *Jesu'* pli oftigas. Oni povas riproĉi al la formo *Jesu'*, ke ĝi ne akordas kun la Zamenhofa kaj oficiala, tre uzata radikoj *Jezuit'*. Tamen la ĝusta kerno de la demando estas, ĉu oni devas ĉe tiu ĉi radikoj sekvi la internacian fonetismon aŭ la internacian grafismon. Ĉe la ofte kaj komune uzataj vortoj la fonetismo estas eble kelkfoje pli atentinda ol la grafismo, kaj la formo *Jezu'* estus preferinda.

Budĝet' aŭ Buĝet'

La formo: *buĝet'*, kiun preferas kelkaj anglaj Esperantistoj, prezentas la gravan malbonaĵon, ke ĝi estas tute nerekoncible por la plejmulto, ĉar la senescepta formo internacia estas: *budget'*. La malaprobantoj de la formo *budĝet'* diras, ke ĝi ne estas ĝuste elparolebla. Tion oni devas konfesi, sed el du neeviteblaj malbonoj la prudento ordonas, ke oni elektu la malpli grandan laŭ la ekzemplo de Zamenhof mem.



Nürnberg,
Murajo apud Mohren-pordego (pordego de maŭroj)

Ark' aŭ Arh'.

Ŝajnas nek eble, nek konsilinde forjeti la literon *h*, kiu cetere estas fundamenta, sed post la litero *r* oni ĉiam pli kaj pli uzas *k* anstataŭ *h*. Ĉu ne estus preferinde, doni en Oficiala Radikaro nur unu formon (anarkio aŭ anarhio) — kiun?

* * *

Konklude mi rememorigas niajn kolegojn, ke ne konvenas trogravigi la aferon: ambaŭ formoj de la dubaj radikoj estas proksimume egale bonaj: ĝuste pro tio la elekto estas malfacila. Persone mi estas indiferenta pri konfidenc' aŭ konfidenci' ktp. Mi esprimis mian preferon por la formo *Jezu'*, sed mi obeeme ne kontraŭstaris la plimulton. Nur pri la formo *buĝet'* mi ne ŝanceliĝas, ĉar ĝi estas, laŭ mia firma opinio, tute kontraŭkutima, maltaŭga kaj malaprobinda. Pri tio tamen la L. K. rajtas definitive decidi.

Prof. E. Grosjean-Maupin, Dir. p. K. V.

(Finota.)

La muŝo.

Antaŭ mia skribotablo mi sidis laborante. Estis varma somera tago. Muŝoj svarmis en mia ĉambro. Kaj jen unu muŝo alflugis kaj sidigis sin sur mian manon skribantan. Mi levis la manon kaj deskuis la muŝon. Sed ĝi revenis, denove ekisidis sur mia mano kaj ĝenis min. Kaj denove mi deskuis ĝin. Tamen obstina estis mia muŝo. Trian fojon ĝi revenis sibilante kaj malhelpis mian laboradon. Tia obstineco de la insekto komencis gajigi min, kaj mi lasis ĝin sidi. Sed nun la muŝo flugis rekte en mian vizaĝon. Tio estis impertinenteco! Rapidan movon mi faris kaj kaptis la besteton. Mi povus mortigi ĝin, sed por kio utilis ĝia morto? Ĝi estis sendanĝera insekto! Do mi malfermis la fenestron kaj eljetis la muŝon. Kaj ĝi ne plu ĝenis min.

Kion vi diros pri tio, kara legant(in)o? Tre simpla kaj tute ne emocia historieto, ĉu ne? Sed la historieto havas analogiaĵon.

Certe estas konata al vi iu s-o Amort, Max Amort en Praust apud Danzig, instruisto laŭ profesio, kasisto aŭ sekretario aŭ kion mi scias de Danziga Esp. Asocio, forpelito el germana teritorio cedita al la poloj, ktp. (ĉiujn liajn „titolojn“ vi povos legi sur diversaj el la multegaj cirkuleroj, kiujn li dissendis tra la mondo). Sed se vi ne jam konas tiun ĉi sinjoron, ĉu vi deziras, ke mi prezentu lin al vi? Li estas fervoregulo, propagandis multe por Esperanto (efektive!), publikigis aplombajn artikolojn en la gazetaro (ekzemple li skribis, ke mondkongreso aranĝota en Danzig

allogos 15—20000 partoprenantojn, k. s.). Sed samtempe li estas nervozega homo, ekscitiga, ekkolerema, ofendema. Pro tio li jam havis akran disputon kun Danziga Esp. Asocio, sed poste li publike konfesis sian kulpon, kaj ĉio reboniĝis por kelka tempo. Tamen antaŭ nelonge danzigaj samideanoj deklaris al mi, ke ili ekspiros, kiam s-o A. forlasos la Liberurbon. Ankaŭ kun mi s-o A. havis disputon (vidu ET 76, kiun mi poste pardoneme forgesis).

Nun en aprilo aŭ majo 1922 (mi ne rememoras precize la daton) mi ricevus 236 gmk. kolektitajn de Danziga Esp. Asocio por s-o Foss en Ufa, kiujn mi transsendis per Hungerhilfskomitee en Berlin sed pri kies bona alveno mi ne estas informita. Noton pri tio mi publikigis en ET n-o 90. Ŝajne s-o Amort ne atente traglegis tiun numeron, ĉar li asertas, ke kvitanco ne okazis. Persone kvitanco la sumeton, mi ne opiniis necese, ĉar publika kvitanco en ET devis sufiĉi; cetere mia tempo estis tiel limita (tiutempe mi devis labori ofte ĝis malfrua nokto), ke estis nepre neeble al mi persone respondi al ĉiu letero, poŝtkarto aŭ demando, eĉ se afrankajo estis aldonita. La tempo de s-o A. ŝajnas esti malpli limita, alie li ne farus tiom da bruo pro tia bagatelo, dissendante pamfleton post pamfleton kun enhavo parte malvera kaj kalumnia kaj kun gravaj ofendoj tute ne pravigeblaj. Ankaŭ monon li

telegrafa bataliono“ kaj en la „Oficira lernejo por ruĝarmeanoj“. En tiuj ĉi cirkonstancoj estas kompreneble, ke la komunistoj-samideanoj sin sentis mastroj de la klubo kaj ni — senpartuloj — estis kvazaŭ iliaj gastoj. Fondiĝis ankaŭ loka (tomska) grupo de „Eski“ (Esperantista Komunista Internacio), kies ĉefsidejo troviĝis en Samara.

La komenca malindulgemo politika iom post iom foriĝis, kaj denove regis konsento harmonia inter komunistoj kaj ne-komunistoj.

Plej bone ilustras tiun staton jenaj vortoj, kiujn la jam nomita s-ano J. F o v e s enskribis en mian memorlibron:

„Eĉ se ni malsamas je l' tuto cetera, La sola ideo de Esperanto jam faras nin samideanoj.“

Per tio mi volas fini miajn rimarkojn kaj elparolas la deziron, ke ni baldaŭ ekhavu de siberiaj samideanoj mem aktualan raporton pri la nuntempa stato de la Esp. movado en la vastega teritorio de Siberio.

W. Matzke, del. de UEA,
Persenbeug, Aŭstrio.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Aŭstrio.

Nova grupo de laboristoj-Esperantistoj fondiĝis en Wien. Kiel konate, en la lasta tempo nia movado preĉpe prosperas inter la proletario, kies intereso je nia afero ja estas tute komprenebla. En Wien la Laborista Societo Esperantista „Fratico“ estas la kerno, kiu sukcese ĝermadas. Ekstis en la lasta tempo nova loka grupo en la 21-a urbodistrikto Floridsdorf, ĉefa industria kvartalo de Wien. Dum la antaŭlasta instrujaro tie estis gvidata kurso kun 20 lernantoj, kiuj finis 8. Ĉijare la sinanoncintaj 197 personoj devis esti disdividataj en 3 kursojn, kaj la nombro pliiĝis konstante dum la kurso. La kaŭzo de tio ĉi rimarkinda fakto certe estis la apliko de tute natura metodo, kiun p akirikis kamarado-instruisto, mem lerninta Esperanton l-aŭ tiu metodo en multkapitejo siberia.

110 anoj kunigis nun en laborokomunumo Esperantista, kies oficiala titolo estas „Fratico“, Laborista Societo Esperantista, Wien, Loka Grupo Floridsdorf, per adreso: Wien XXI/1, Arbeiterheim. Ĝi estas bone organizita kaj havas firman laborprogramon, kies ĉefa principo estas, helpi la unuiĝon de l' proletario tutmonda sur la bazo de interna labordivido.

La nova grupo salutas elkore ĉiujn samideanojn de l' terglobio; preĉpe la kamaradojn el ĉiuj terpartoj, kaj petas ĉiujn, helpi laŭpove kaj okaze ĝian laboron. Ĝi atendas korespondatajn.

Ligo de germanaj Esperanto-societoj en Ĉeĥoslovakio.

En B.-Leipa fondiĝo de la labora distrikta unuiĝo B.-Leipa de la Ligo.

En Freiwalddau la nove fondita grupo bone laboras. Kunveno en privata domo de l' estrino ĉiuvendrede vespere. En Jägerndorf la 15. februaro s-o Horn paroladis inter laboristoj en la laborista hejmo de Jägerndorf pri Esperanto. La interesa parolado estis ofte aplaudata, kaj montriĝis, ke ĉi tie inter la laboristaro estas granda intereso por Esperanto. Ĉeestis la paroladon 70 personoj. Kurso komenciĝos. La unuiĝo de germanaj Esperantistoj aranĝis post fino de du bone sukcesintaj kursoj novan kurson por komencantoj, vizitatan de 28 personoj, kaj perfektigan kurson. Unuan gvidas s-o instruisto Wunsch, duan s-oj ing. Aurich kaj pastro Herkommmer.

En Haida dum la jara ĉefkunveno oni elektis jenajn estraron: Prez. W. C. Meissner, vic-prez. f-ino L. Retter, sekr. f-ino Schwarzbach, kas. s-o Prof. Eiselt, bibl. f-ino Tille.

En Hohenstadt fondiĝo de la labora distrikto Mähr. Schönberg la 18. febr. Alĝis Esperantistoj el Landskron, M. Schönberg, Hohenstadt, Zwittau, M. Tübau, Hoflenz, Hannsdorf kaj Triebendorf.

En Leitmeritz en Monahineja lernejo por knabinoj instruas fratino Sigisberta (state ekzamenita) 25 lernantinojn; du horojn po semajno. En la Burĝa lernejo instruas en la 4-a klaso por knabinoj instruistino Wadtoch (state ekzamenita). En Gimnazio instruas prof. D-ro Hiekel lernantojn en privata kurso. S-o prof. D-ro Hiekel gvidas ankaŭ publikan kurson de la unuiĝo por plenguloj. Konversacia kunveno de la grupo ĉiusemajne du horojn en la urba biblioteka ĉambro. La Leitmeritzer Zeitung aperigas ĉiusemajne Esp.-angulojn kaj kursojn por la legantoj.

En Moschen apud Kosenblatt laŭ invito de socialista junularo en Moschen-Welhenitz s-o B. Guttman el Pyhanken faris la 25. febr. propagandan paroladon pri „Internacia mondhelpingva problemoj kaj laboristaro“. Kurso gvidota de s-o Guttman komenciĝos la 11. marto.

En Reichenberg dum la jara ĉefkunveno oni elektis jenajn estraron: Prez. Hübner, vic-prez. Prof. Scholze, sekr. s-o M. Gahler, Schiller, kas. f-ino Rödiger, Umann, bibl. f-ino Hagenstein, s-o Michalek. La grupo elektis novan klubegon en la „Urstoffhalle“, kie la grupanoj kunvenas ĉiuvendrede. En klubego paroladis s-o Brejcha pri „Vojaĝo en Svislando, Francujo kaj Norda Afriko“, s-o Prof. Scholze pri „Lando, popolo kaj kulturo de Finnlando“. Li disdonis propagandilojn de la Finlanda Foiro. Konversacia kunveno ĉiusemajne en ejo de Y. M. C. A. de la 8—10-a vespere.

En Teplitz s-o Kreibitz finis kurson kun 12 anoj kaj aranĝos perfektigan vesperon ĉiusemajne en la kunvenejo. La 7. 2. ĉefkunveno de la grupo. „Teplitzer Zeitung“ enhavas ĉiusemajne Esp. angulon. Elektitaj delegitoj de UEA: Del.: D-ro Ed. Knauer, vic-del.: Jul. Kreibitz. Alĝis 5 anoj al UEA.

En Troppau okazis la ĉefkunveno de la germana unuiĝo. Prez. Prof. Zimmer, vic-prez. s-ino Retschek, kas. s-o Teichmann, sekr. s-o Seidel, bibl. s-ino Zimmer. Kurso por komencantoj bone sukcese finiĝis.

En Turn Parolado de s-o Taubmann pri Esp. 120 aŭskultantoj. Kurson gvidas s-o Jula kun 48 gepartoprenantoj. En Eichwald kaj sekcion en Wistritz-Pyhanken oni elektis dum la ĉefkunveno jenajn estraron: Prez. A. Schuster, vic-prez. s-o B. Guttman, sekr. s-o Guttman, vic-sekr. s-o Skokan, kas. s-o Veit, s-o Goschala. Ĉiumerkrede perfektiga vespero en la „Esperanto Hejmo“ Pyhanken.

En la socialista ĵurnalo „Freiheit“ (Libereco) aperas ĉiusemajne Esp. angulo. Klubejo por Eichwald en la gastejo „Zum Rosengarten“.

En B.-Kamnitz Regulaj kunvenoj ĉiumerkrede en la grupeto „Hotelo Posti“. La 10. 2. karnevala vespero kun bona propaganda sukceso.

En Bodenbach-Tetschen la 10. 2. karnevala balo sub la titolo „Unu nokto en Esperantujo“. Ĉeestis proksimume 200 personoj. Bona propaganda kaj financa sukceso. Partoprenis gastoj de la grupoj el Aussig, Leitmeritz, Teplitz, Krochwitz, Haida, Königshof. La 21. marto okazos ĉefkunveno en la grupeto „Zeughaus“ en Bodenbach.

Francujo.

La Federacioj.

En diversaj regionoj de Francujo la lokaj grupoj starigis regionajn federaciojn, ekzistantajn jam antaŭ la milito. Regule funkcias tiuj de la Pariza regiono (Paris), Centro-Okcidento (Orléans), Nord-Oriento (Reims), Oriento (Strasbourg) kaj Mediteraneo (Marseille). La revivigo de la federacioj estas pruvo de reorganizo de la Esp. movado en Francujo.

La Mediteranea Federacio, kiu nun konsistas el 12 grupoj, festos paskon sian unuan ĝeneralan kunvenon. Jen la programo:

Siberiaj rememoroj.

Kiel kompletigo de l' artikolo de s-o T. Kilian en n-o 123 estu aldonata ankoraŭ jeno: Dank' al la perigo de la komunistaj klubanoj de l' Tomska Societo Esperantista la gubernia „Dopolkleriĝa Fakto“ subtenis ĉiamaniere la agadon por Esperanto. Ĝi donis telefonon, skribmaŝinon, skribmaterialon al la klubo, havigis ejojn por kursoj, pagis salajron al la kursgvidantoj kaj subvenciis eĉ la kluban kason. Estis aldonata Esp.-rusa vortareto, mendataj el Omsk kelkcentoj da gramatikoj (malgrandaj) de l' konata rusa samideano A. A. Saharov ktp. Tre vigla estis la propagando inter la militistaro; kursoj oficialaj estis ĉe la „Internacia bataliono“, ĉe „Radio-

31. marto, 20-a horo. Ekzameno por la Atesto pri Kapabl-eco (skribparto).
1. 1. aprilo, 8 h. Ekz. por la A. p. K. (buŝparto). -- De 9 h. ĝis 12 h., ĝenerala kunveno de la Federacio. Samtempe, por la samideanoj ne interesataj de la kunveno, promonado tra la urbo kaj suprenirado, ĵifto aŭ piede, al Notre-Dame de la Garde. 12 h. festeno (8 frankoj) de ĉiuj ĉesotaj. -- 14 h. surmara promeno (3 fr.) -- 19.30 h. komuna vespermanĝo (6 fr.) -- 21 h. Senpagaj koncerto kaj prezento de teatraĵo.
2. aprilo. -- Ekakurso por specialaj aŭtomobiloj al m. nio Sainte-Baume, plej pentrinada parto de Provence; ekveturo je la 7-a, reveno al Marseille je la 20-a (26 fr. por la irrevena bileto kaj la tagmanĝo de la hotelo en Sainte-Baume).
La organizantoj de la festo varmkore invitas la ekster-regionajn kaj landajn samideanojn, ke ili venu multope; certe, ili ne domagos la elspezon.

Italujo.
Novaj kursoj en Mantova (paŝtro Ravaneli), Milano (por foirano), Padova (du devigaj kursoj por lernantoj de Reĝa Komerca Instituto, gvidataj de s-o Allegranzi, alia kurso de Vespera Lernejo, gvidata de grato Rinaldi), Venezia (por instruistoj kaj komercistoj), Verona. En Terni fondiĝis komitato por organizi la 8-an nacian Esp. kongreson.

Litovujo.
Esp. rondeto „Verda Kverko“ en Doinava kunvenis la 8. febr. en Supera Agrikultura Lernejo. S-o Gaigalas parolis pri la Esp. movado de la Helsinkia kongreso ĝis nun. La rondeto nun havas 85 membrojn; funkcias du kursoj por komencantoj kaj unu por progresintoj (entute 60 kursanoj); la biblioteko konsistas el 235 volumoj. La rondeto abonas kvar Esp. gazetojn. Laŭ propono de s-o Baublys oni eldonos propran ŝapirografotan gazeton.

Meksikujo.
La „Esp. Amikaro“ de Meksiko faris ekskurson al „La Fonto“ de Tlalpam, disdonis propagandilojn ktp.
S-ano Luis Cabada Molino fondiĝis komercan lernejon en Tezintlan (ŝtato Puebla), kie li ankaŭ instruas Esperanton.

Pollando.
Bydgoszcz La urba magistrato disponigis la urban lernejon de Comenius je senpaga uzado por kursoj kaj kunveno de la soc. „Esperanto“. Bilindulnistrulo Lelewel parolis en januara kunveno pri „Instruo de blinduloj“. La 20. jan. la societo „Esperanto“ festis la 40-an datrevenon de la naskiĝtago de mondgeniulo Nicolaus Copernicus, elpensinto de la suncentra sistemo en la universo. S-o Prengel festprologis. Copernicus naskiĝis en la najbara urbo Torun (Thorn).
Inowracław. Post prop. parolado de s-o Monerzyski fondiĝis „Kuliva Esp. Societo“ (prez. prof. Orzech). Funkcias Esp. kurso; plejparte ĝeinstruistoj. Łódź. Fondiĝis lab. Esp. societo, filio de varsovia „Laboro“ (prez. urbestro Przyczwalski kaj s-o Rapsalski). Lublin. Esp. ekspozicio kaj propaganda parolado de s-ano Pruski. Organizita „Lublina Rondo Esp.“ Kurso (20 p.) gvidas s-o Z-wada. Loka gazeto „Dzień Polski“ favaris al Esp.

Warszawa. En societo „Konkordo“ kaj „Laboro“ lingvistikaj paroladoj de prof. Baudouin de Courtenay. Pola Esperanto Servo (gvidanto Fr. Prengel) nun farita speciala Esp. fako en la konata malnova teatro Odeon (posed. E. Poplitz), kuŝanta preskaŭ en la centro de la urbo Bydgoszcz, Długa 1. Oni bonvolu noti la novan adreson. La oficejo estas malfermita ĉiutage de 9-11 kaj 5-6 h. Pro allegaj paper-kaj afankokostoj Pola Esp. Servo povos estonte respondi nur, ricevinte sufiĉajn poŝtmarkojn (de poloj) resp. respono-kuponon aŭ monbiletojn (de eksterlandanoj).

Rumanlando.
La gesamideanoj de Timiŝoara festis en la 4. marto Esp. jaron, kiu havis la karakteron de kongresito, ĉar ĝi estis la unua jaro de la Esperanta movado en Rumanlando. Okazis publika ekzameno, propaganda kunveno kaj teatra prezentado. Se estos loko, ni publikigos detalan artikolon en venonta numero.

La Internacia Ligo de Militkontraŭuloj
(adreso: H. Runham Brown, „Fairleigh“, Abbey Road, Enfield, Middlesex, Anglujo) ĵus eĉidoni hektografitan raporton en Esperanto pri la Konferenco de la Internacio de Absolutaj Kontraŭ-Militaristoj (The War Realists' International - W. R. I.) en Blithoven (Nederlanda) la 16-17. dec. 1922, ĉe kiu estis reprezentataj la landaj ligoj de Aŭstrio, Anglujo, Germanujo kaj Nederlando, kaj delegitoj el Svisujo, Kanado kaj Usono. La devizo de tiu movado estas: „Milito estas krimo kontraŭ homaro“.

Skoltismo.

„La Libera Vojo“
Antaŭ kelka tempo la Skolta Esperantista Ligo sukcesis akiri la subtenon de la angla ĉiumonata gazeto „The Trail“ pri kio oni anoncis en „ET“; sed kelkajn monatojn poste la Esperanto sekcio subite malaperis sen la klarigo. Nun mi povas klarigi la aferon kaj anonci fakton, kiu ĝojigos la korojn de tiuj, kiuj interesiĝis pri „The Trail“ kaj S. E. L.

Lastatempe la Brita Skolta Ĉefsidejo aĉetis „The Trail“ de la privatulo kies proprajo ĝi estis kaj, ĉar ĝi ne jam komprenas la valoron de Esperanto -- almenaŭ ili ne jam publike subtenas ĝin --, ili malpermesis ke s-o K. Graham Thomson daŭrigu sian laboron kiel Eksterlanda Redaktoro. Nun ili kunfondigis „The Trail“ kun sia oficiala organo „Headquarters Gazette“ („Ĉefsideja Gazeto“) sub la titolo „The Scouter“ („La Skoltestro“).
Tiu kunfondigo kaŭzis mankon kaj tiun mankon plenigos alia nova gazeto, „The Open Road“ („La Libera Vojo“), kies posedantoj petis s-on Thomson plenumi la rolon de Eksterlanda Redaktoro. Tamen mankas al tiu samideano la tempo; tial li aranĝis, ke mi anstataŭu lin. La nova gazeto traktos la samajn temojn, kiujn traktis „The Trail“, kaj la sama kontribuantoj kunlaboros por ĝi.

Ĉiumonate oni presigos sekcieton en Esperanto pri la S. E. L. ktp., kaj mi tradukos angla-lingven, kaj redaktos raportojn ricevitajn plejparte en Esperanto el eksterlandoj. Mi ĉiam bonvenos raportojn pri geskoltismo, atletiko, tendarado, plenaeraj aktivecoj ktp., kaj al ĉiu, kies raporton mi presigos, mi sendos ekzempleron de la gazeto.

Alie la jara abono estas kvar anglaj ŝilingoj, afrankite aŭ kvar anglaj penceoj por numero. Abonojn oni sendu al mi ĉe „The Open Road“, Denison House, 296, Vauschall Bridge Road, London, S.W. 1.

Ju pli multenombra fariĝos la Esperantistoj-abonantoj, des pli granda fariĝos la Esperanta fako de la gazeto. Jen mia celo! -- Kiu volas helpi, ekrianiĝu kun la Eksterlanda Redaktoro,

J. W. Leslie
(Propaganda Fakteiro de S. E. L.)

Kultura Vivo.

Nacia Kultura Apoteozo.

